


Numero: 304.
Septembro 2017.

25-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Esperanto ne estas mirindaĵo

Per Esperanto la homaro ankoraŭ ne povis haltigi militon. Ĝi ne ĉesigis la malriĉecon sur nia terglobo. Vane ni esperantistoj revadas, iam nia lingvo alportos al ni la pacan kunvivadon. Tio ĉi ne pendas de Esperanto.

Por ke tiu realiĝu, la homaro devus ŝanĝiĝi. En la cerboj devus naskiĝi novaj pensoj. Nia koro samtempe devus pulsadi.

Ĝis mankas tiu ĉi harmonio, sur Tero ĉiam estos militoj.

Oni diras, baldaŭe erupcios la tria mondmilito, kiu estos pli terura, ol la antaŭaj. La atommilito forbruligus nian planedon, kaj ni jam nun preĝu, tiu ne okazu.

Mi ne volas, ke nia belega terglobo fariĝu senviva dezerto.

Esperanto ne povas haltigi atommiliton. Vortoj estas malfortaj. Se per ĝi ni parolas pri la danĝeroj, tio ne sufiĉas.

Ĉiu homo devos senti profunde en sia koro: kio nun kaŝiĝas en la aero, tio ne estas simpla ludilo, kiel en videoludoj sur la ekrano de la komputilo.

Se la monstro liberiĝos, neniu povos haltigi ĝin. Vane ni svingadas nian verdan flagon kun verda stelo, ankaŭ ĝi fariĝos cindro en la giganta fajro, kiu trakuregas la terglobon ruinigante ĉiun urbon kaj vilaĝon.

Kio restos el la bela sonĝo de doktoro Zamenhof? Eble nenio. La libroj, kompaktaj diskoj, filmoj, bendoj malaperos.

Eble restos kelkaj homoj, kiuj post kelkaj jaroj tute forgesiĝos pri Esperanto. Ili ĉefa zorgo ne estos internacia lingvo. Ja, la homaro apenaŭ ekzistos. Ili loĝos fore de unu la alia.

Ne estos plu lingvaj malfacilaĵoj. Diverslingvaj homoj apenaŭ renkontiĝos, se tamen, tiam ili atakas unu la alian por forrabi la akiritan nutraĵon.

Jes, karaj amikoj, la homaro denove trovos sin en praepoko, kaj vivos en grotoj tremante de la morgaŭo.

Eble nun mi priskribas la estonton tre malhela, eĉ nigra. Eble iel tamen ni evitos la katastrofon.

Laŭ mi la homaro denove havas pli grandan zorgon, ol akcepti Esperanton, kiel duan lingvon.

Malgraŭ tio mi restos ankaŭ en la estonto entuziasma esperantisto, sed mi jam ne kredas, ke ĝi povos haltigi la militon.

— Redaktanto —



Knabino, kiu parolis ĉiujn lingvojn

Ŝia nomo estis Katerino aŭ kromnome Kanjo. Ŝajne ŝi estis ĉiutaga knabino kun bela, longa, blonda hararo.

Longe, eĉ ankaŭ ŝia patrino ne sciis, kia trezoro kaŝiĝas en la cerbo de la knabino.

Kiam ŝi naskiĝis, Kanjo ploris, babletis, kiel la aliaj beboj. La kuracisto trovis ĉion en ordo.

La unuaj strangaj signoj estis videblaj kaj aŭdeblaj en la dua jaraĝo. La knabineto komencis paroli strange. La gepatroj ne komprenis ĉiun vorton.

Oni diris, dujara infano ofte elbuŝigis nekonatajn frazetojn. Kvazaŭ ili estus similaj al la franca aŭ alia mondlingvo.

Certe Kanjo aŭdis ilin en la televido. La familianoj volonte rigardis eksterlandajn televidokanalojn pere de satelito.

Sed kiam ŝi ekparolis arabe aŭ en iu ne tro konata lingvo, ĉiu en la familio ekmiris.

La avo infanaĝe lernis la mandarinan lingvon, ĉar lia sonĝo estis vojaĝi al Ĉinio. Bedaŭrinde tio neniam realiĝis pro monomanko.

— Ja, mia nepineto scias la mandarinan lingvon! — ekkriis la avo.

— Certe kaŝe vi instruis al ŝi la lingvon — diris serioze la avino.

— Ne, ne! — protestis la avo. — KREDU min, mi eĉ unu mandarinan vorton instruis al Kanjo. Ŝi ne nur vortojn scias, eĉ kompletajn frazojn. Ŝi flue parolas ĉi tiun malfacilan lingvon.

Kiel la knabineto kreskiĝis, preskaŭ en ĉiu tago malkaŝiĝis, ke ŝi scias novan lingvon. Fine jam ne ekzistis lingvo, kiun ŝi ne estus sciinta.

La famo de tiu eksterordinara talento fulmrapide divastiĝis. Unue nur en la urbeto estis sensacio. La homoj ariĝis ĉe la domo kaj kriegadis plengorĝe:

— En tiu ĉi domo loĝas knabino, kiu parolas ĉiujn lingvojn.

La famo disflugis en la tuta lando. Post kelkaj semajnoj jam ankaŭ televido kaj radiokanaloj venis por fari intervjuon kun la knabineto kaj la gepatroj.

Neniu komprenis tiun ĉi eksterordinaran talenton. Lingvistoj, sciencistoj vane ekzamenis Kanjon, ili ne povis diveni, kiel povas okazi tiu ĉi ne ĉiutaga scio. La knabineto sciis ĉiujn ekzistantajn lingvojn, eĉ ankaŭ kelkajn mortajn lingvojn.

De kie aŭ de kiu ŝi akiris tiun ĉi scion? Neniu sciis. En la familio krom la avo neniu parolis fremdan lingvon.

Kiom bonege estus trovi, tiun genon, kiu posedas tiun ĉi kapablon.

— Ŝaŝa —



Ĉareto



Viro puŝas ĉareton. Ĝia supro estas kovrata per drapeĉo. Ne estas videbla, kio estas en la ĉareto.

La viro ŝvitas. Li puŝas ĝin supren al la monto. Laciga laboro estas puŝi pezan ĉareton sola. Eble, se ili estus duope, tiam la puŝado ne estus tiel ŝvitiga.

Kion fari, li estas sola. Neniu helpas al li. La viro ne ŝatas dankegi. Kion li povas, tion li faras sola.

Tamen nun jam li bedaŭras, ke li ne petis helpon de sia najbaro. Certe ankaŭ la vilaĝanoj estus helpintaj kaj kune ili povintus suprenpŝi la ĉareton.

Ne gravas. Li puŝos ĝin supren. La gloro estos nur la lia.

Li ege ŝvitas kaj pro la laceco jam apenaŭ povas iri.

Juna viro venas malsupren de sur la monto. Li arogante demandas:

— Ĉu vi deziras, ke mi helpu al vi? Mi estas tre forta junulo. Rigardu miajn muskulojn!

— Dankon, mi ne bezonas vian helpon. Ĝis!

La junulo strange postrigardas la viron puŝantan pezan ĉareton kaj fine li laŭte ridegaĉas,

La viro puŝas plu la ĉareton supren. Apenaŭ li iras kelkajn metrojn venas alia homo. Li estas tre maljuna. Liaj manoj tremas. La maljunulo ekparolas:

— Ĉu mi helpu, sinjoro?

— Ho, onklo, ja vi apenaŭ povas iri! Kiel vi povus puŝi la ĉareton?

La maljuna homo respondas triste:

— Prave, mi jam estas maljuna. Iam mi estis juna kaj forta. Rigardu la iamajn lokojn de miaj muskuloj! — li fiere montras siajn brakojn.

La viro ne haltas, ĉar se li farus tion, tiam li ne povus daŭrigi la puŝadon de la ĉareto.

Iri kaj iri, ĉiam supren al la monto. Se li ne rezignos, iam atingos la supron.

Li adiaŭis de la maljunulo kaj kolektante sian lastan forton puŝas plu la ĉareton.

— Adiaŭ, onklo! — li krias. — Mi tre dankas, ke vi volis helpi.

Denove li estas sola sur la monta vojo kaj puŝas kaj puŝas la ĉareton.

La supro ankoraŭ estas malproksime. Li ne volas pensi pri tio. Ofte estas pli bona, se oni ne scias kiom longa estas la irenda vojo.

La sunradioj varmege karesadas sian vangon, kie senĉese ruliĝas ŝvitogutoj. Estus bone viŝi la vangon kaj trinki glason da glacia akvo aŭ ŝaŭmanta biero.

Li jam delonge ne trinkis. Sed nun ne eblas, ĉar se li haltas, tiam li ne povas daŭrigi la vojon.

Se almenaŭ ne sunus. Kial ne kovras la firmamenton nuboj, kiel hieraŭ. Tiam ankaŭ pluvis. Kiom bone estus, se nun malvarmeta pluvogutoj kisadus lian kalvan kapon.

Li revadas dum la puŝado de la ĉareto.

Subite la revadon ĉesas virina voĉo. Ĝi estas ĉarma kaj afabla.



Ĉu li songas? Aŭdi karan virinan voĉon por li mem la ĉielo.

Kion ŝi volas?

— Salut'! Ni puŝu kune la ĉareton! — ŝi diras kaj alpaŝas la viron.

La virino per sia tuko viŝas lian kapon kaj dume ridetas.

— Dankon — li balbutas. — Dio sendis vin al mi.

Ŝi donas al li malvarman akvon el sia botelo kaj fine ankaŭ ŝi komencas puŝi la ĉareton.

La lacego forflugas. La viro rigardas per brilantaj okuloj ŝin.

Supre sur la monto ilin atendas tri infanoj. Du knaboj kaj unu knabino. Iliaj infanoj, la senco de ilia vivo.

La viro elverŝas el la ĉareto ĉion kaj poste lia animo plifaciligas. Li alvenis la supron kaj kontente reregardas de kie li ekiris.

— Apáti Kovács Béla —



Poezio

Mi ne ĉiam ŝatis legi poemon, eĉ estis tempo, kiam ĝi tedis min. Mi ne ŝatis, kiam en la lernejo mi devis ellerni iun version parkere.

Mi ofte protestis: „Kial oni devas ellerni versojn? Kie mi povos uzi ilin. Ja, mi ne deziras fariĝi aktoro. Versojn lernu la geaktoroj! ktp.”

Interese, nun tiuj versoj, kiuj tiutempe tedis min, tie ĉi zumas en mia kapo. Se la vivo estas malfacila, ili helpas.

Mi ĝojas, ke miaj geinstruistoj devigis min ellerni versojn parkere. Tiam mi ne sciis, tiuj versoj akompanos min ĝis la tombo.

Do, vi lernu kaj legu poemojn, ĉar ili orumos vian vivon!

— A.K.B. —

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

John S. Dinwoodie
La soleca dio

Noktmezo kaj mallumo – unu stelo
briletis sur velura fon',
tutsola en la vasto de l' ĉielo;
veadis venta monoton'.

Rigardon ĵetis mi al nokto nigra;
mallaŭte en la malproksim'
aŭdiĝis krio de ansero migra;
animon mian skuis tim'.

Teruris tamen min nek la insido
de l' nokto, nek la birdo-kri',
sed kvazaŭ en abismon, la ekvido
en koron de soleca di'.

Solecon lian la natur' spegulas
en si fidele; ĉiu sent'
de l' granda universo-kor' modulas
la tonojn de l' multvoĉa vent'.

Sur la sennombraj montoj de l' eterno
majestas li en sol-seren',
la ĉion-direktanta vivokerno,
ekster la homa komprenem'.

Profundas tiom la soleco dia,
ke l' homo ne solecas pli
en morto-horo, ol en vivo sia
solecas en eterno di'.



John S. Dinwoodie

Strebado

Laboron vian faru en fidelo,
eĉ se la sorto estas: malsukcesi.
Surgrimpu krutajn montojn sen ribelo,
eĉ kvankam poste devos vi regresi.

Pli bone, per plenstreĉa forto vivi
kaj tamen maltrafadi la vivcelon,
ol laŭ la fluo de la Tempo drivi
ne bedaŭrante stretan vivŝanelon.

Pli bone, alten grimpi kaj defali
de montoflank', ol vivi ne strebante;
aŭ, malvenkante, ĝis la fin' batali,
ol paŝi tra la vivo – diletante.



Por infanoj



La amikino de Peĉjo

Peĉjo ne havis geamikojn. Li estis malamikema knabeto. Se iu knabo aŭ knabino proksimiĝis al li, Peĉjo akceptis ilin kolereme.

Post iom da tempo en la infanĝardeno jam neniu deziris ludi kun li.

Dum la tuta tago li sidadis sola en la ludĉambro.

La infanĝardenistino scivole demandis lin:

— Peĉjo, kial vi ne ludas kun la infanoj? Ĉiam vi estas sola.

— Kun neniu mi deziras ludi — respondis lipmiene.

La infanĝardenistino povis fari nenion pri Peĉjo.

En iu tago alvenis nova infano. Ŝi estis bela, blonda knabino. Antaŭ nelonge ŝi translokiĝis ĉi tien kun siaj gepatroj.

Ŝi konis neniu en la infanĝardeno. La infanĝardenistino prezentis ŝin al la geknaboj. Poste Manja, ĉar ŝi estis ŝia nomo kuris al la geknaboj kaj ŝi tuj komencis ludi kun ili.

Baldaŭ ŝi rimarkis la solan Peĉjon.

— Venu por ludi kun ni! — diris la knabino.

— Li ne volas ludi kun ni — ridis moke la aliaj. — Peĉjo estas malamikema knabo. Ni lasu lin sidi en la angulo de la ludĉambro.

La interesiĝon de Manja vekis Peĉjo. Ŝi lasis la infanojn kaj iris al li.

Unue la knabeto akceptis ŝin malamikeme kaj li diris:

— Foriru! Mi ne deziras ludi kun vi. Mi volas resti sola.

Sed Manjo rezignis. Ŝi parolis al li, kvazaŭ nenio estus okazinta. Kvazaŭ Peĉjon

estus ŝia plej bona amiko.

— Imagu! — ŝi diris ridetante. — Mi havas hundon. Ĉu vi ŝatas la hundojn? La nomo de mia hundo estas Bodri+.

Komence la knabeto provis ne atenti pri Manjo, eĉ ankaŭ siajn orelojn li kovris per manplatoj. Sed kiam li sciiĝis pri la hundeto de la knabino, liaj okuloj ekbrilis.

— Ĉu vi havas hundon?



— Jes — venis tuj la respondo. — Mi tre ŝatas la bestojn. Eĉ mi havas ankaŭ du katojn.

— Ankaŭ ni havas katon — ĝojegis la knabeto. Ĉu vi montros al mi viajn bestojn?

— Jes, kompreneble — respondis gaje Manjo. — Hodiaŭ mi parolos kun miaj gepatroj kaj en iu tago vi venos al ni. Ĉu bone?

Ekde tiu ĉi tago Peĉjo ŝanĝiĝis. Nun jam ankaŭ li havis amikino. Li plu jam ne sidadis sola en la angulo de ludĉambro. Li ludis kune kun la aliaj etuloj je la ĝojo de la infanĝardenistino.

— Onklo Adalberto —



Humuro

Ebriulo enbusiĝas kaj li sidiĝas apud maljunulinon, kiu malestime rigardas lin. Fine ŝi diras al la viro:

— Filo mia, vi elektis malbonan vojon. Ĝi kondukas al la infero.

— Dio mia! — eksaltas la ebriulo. — Mi denove ege eraris. Ĉi buso veturas malĝustan direkton.

— i —



— i —

— Panjo, ĉu mi rajtas doni monon al viro, kiu kriadas sur la strato?

— Kion li kriadas?

— Glaciaĵo! Ĉi tie estas la bongusta glaciaĵo.

— i —



Humuro

Fine de la dimanĉa meso la pastro diras al la homoj:

— Karaj kredantoj, mi havas bonan kaj malbonan novaĵon. La bona novaĵo estas, ke ni havas sufiĉe da mono por renovigi la turon de nia preĝejo. La malbona estas, ke ĉi mono ankoraŭ estas en via monujo.

— i —



— i —

— Diru najbaro, kial vi estas tiel nervoza?

— Ĉar mi iris al la lago por fiŝkapti.

— Ĝis nun mi pensis, ke ĝi estas trankvila hobio.

— Jes, kompreneble, se oni havas permesilon por fiŝkapti.

— i —



— Ĉu laŭ vi ĝi estas hemoroido?

